

# POLA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO DE POLAJ ESPERANTISTOJ

---

1922



# Pola Esperanta Komerca

Włodzimierz  
Wojciechowicz  
& K-ino

**Agentejo**  
„P.E.K.A.“

Łódź, Kiliń-  
skiego 99,  
Pollando

Plenumas ĉiujn servojn por industrio kaj komerco.  
: Perado : Informoj : Reklamo : Reprezentado :

Ligno, karbo, pe- Filtoj kaj agen- Papiero, skribma-  
trollo, salo, pro- tejoj en ĉiuj gra- terialoj, galanteria-  
duktoj de tekstila tejoj en ĉiuj gra- joj, maŝinoj k. ĉiuj  
industrio. vaj polaj urboj. artikloj por indu-  
strio.

**PEKA** estas fondita en la plej grava centro de pola ko-  
merco kaj industrio (ĉirkaŭ 1000 fabrikoj, pli ol  
500.000 da loĝantoj) por pruvi per aplikado en ko-  
merca vivo la praktikan taŭgecon de Esperanto,  
kaj tial

**PEKA** atendas plej favoran subtenon de ĉiuj Esperantaj,  
aŭ uzantaj Esperanton kiel helplingvon, komercaj  
institucioj, organizaĵoj kaj apartaj E-toj.

**PEKA** turnas sin al ĉiuj eŭsterlandaj kaj enlandaj komer-  
caj oficejoj, agentejoj, bankoj, komercaj ĉambroj  
kaj al komercistoj kun la peto senprokraste sendi  
al ĝi siajn katalogojn, prezarojn, ofertojn, speci-  
menojn, kondiĉojn de komercaj servoj ktp.

**PEKA** petas, ke ankaŭ ĉiuj Esperantistoj, per viaj en okazo  
de bezono doni informojn pri siaj landaj eksport- kaj  
importejoj, pri lokaj aĉetbezonoj, komercaj rilatoj,  
kredita kapableco de komercistoj, aŭ peradi en  
reklama fako, akcepti aĉet- aŭ vendreprezentadon,  
tuj sendu al ni siajn adresojn kaj kondiĉojn.

**PEKA** insiste petas ĉiujn Esperantajn komercajn gazetojn  
kaj ĵurnalojn kiel ankaŭ ĉiujn eldonejojn de presaj  
Esperantaj, precipe enhavantaj komercajn anoncojn  
kaj komunikojn, plej urĝe sendi al ni la specimenajn  
numerojn. Se ni ne donos nian anoncon aŭ ne  
abonos, ni tuj pagos, aŭ resendos la specimenon.

**PEKA** en tuta Pollando je la plej favoraj kondiĉoj prizorgas  
reklamon, dissendas ĉirkulerojn kaj komercajn komu-  
nikojn, donas komercajn informojn, peras en komer-  
caj rilatoj, akceptas, aŭ rekomendas reprezentadon  
kaj ĝenerale plenumas ĉiujn komercajn servojn.

Korespondas en ĉiuj eŭropaj lingvoj, sed prefere  
en Esperanto.



# POLA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO DE POLAJ ESPERANTISTOJ.

JARO XVII

WARSZAWA — JANUARO 1923 J.

Nº 4 (90)

## Novjaraj konsideroj.

Ni eniras en la novan jaron de nia pena, paca batalado por la amata ideo. En tia momento bone estas ekrigardi malantaŭen, jeti la okulon sur la trapasitan vojon, konstati la ĝisnunajn rezultojn por mezuri ĝuste tion, kion oni faros morgaŭ.

Kion alportis al ni 1922?

Sur la internacia batalkampo: la Geneva Konferenco de Instruistoj; la Kongreso en Helsinki kaj fondo de Oficiala Esperantista Organizo; la granda verko de la 1922-a jaro: la Raporto de Generala Sekretario de Ligo de Nacioj.

Sur la Pollanda: la rapida kresko de Pola Esperantista Societo tra la tuta Respubliko; la Unua Pollanda Kongreso kaj la II Konferenco de P. E. S.; la fondo de Federacio de Esperantistaj Societoj en Polujo, la reapero de „Pola Esperantisto“.

Ĝuste ni povas esti fieraj. La movado ne falas, ĝi iras antaŭen. Ĝi ne estas utopio de kelkaj idealistoj, tro longe ĝi vivas por tio, tro profunde enradikiĝis jam en la korojn kaj cerbojn de multaj seriozaj kaj saĝaj homoj tra la tuta mondo. Per la vortoj de Esperanto sonas al niaj oreloj dolĉa melodio de estonto, sonas la lingvo, kiun vere parolos iam tuta homaro, fratigita en kultura kunlaboro.

Jes, ĝi okazos malgraŭ „ridoj kaj moko“, ke la „guto konstante frapanta“ traboros la „granitan monton“ de homa obstino — kaj ĉiuj popoloj danke honoros la memoron de granda Polo, Doktoro Ludwik Zamenhof. Ni rajtas ne nur esperi, ni rajtas kredi tion senhezite. Da utilo de nia lingvo, ĝia simpleco, ĝia potenca beleco ĉiam sorde altiros homojn, kiuj kapablos antaŭenigi la laboron. Sed

kiuj ili estos? Ĉu — kaj en kía grado — ni mem rajtos nin alkalkuli al ilia nombro — jen demando, kiu en tiu ĉi momento de novjara esploro de konscienco devas prezentigi al ĉiu Esperantisto.

Ni estas homoj, kiuj unuj el la unuaj ekvidis tiun veron, ke Lingvo Internacia jam naskiĝis. Tio estas granda honoro, tio estas ankaŭ granda ŝarĝo kaj morala respondeco antaŭ la mondo, antaŭ venontaj generacioj. Tiu respondeco kreskas pli kaj pli. La movado iras antaŭen, ĝi ĉirkaŭprenas pli vastajn sferojn, levigas ĝia aŭtoritato, fondiĝas novaj organizoj, necesaj estas lertaj kaj spertaj laborantoj, kiuj scios alparoli la ŝtatajn povojn, penetri en la rondojn de instruistoj, industristoj, komercistoj, fine konvinki kaj instrui la amason. La unuaj disĉiploj de nia Majstro, lerninte mem la lingvon, povis (se ili ne estis literaturistoj) kontentigi per modesta persona propagando. Ni iliaj sekvintoj, ni havas multe pli vastan kaj komplikitan agadkampon. Individua, izolita propagandisto ne sufiĉas plu — li estas postsigno de pasinta jam periodo — niaj nuntempaj bezonoj postulas nepre grandajn, fortike laborantajn asociojn, kie ĉiu povus esti, laŭ personaj kvalitoj kompetentoj, starigita en ĝusta loko kaj ĉe ĝusta loko kaj rilo. Ni ne rajtas malŝpari niajn fortojn, ni devas unuigi ĉiujn kaj ĉion en unu potencon, organismon, rezistan kaj efikeblan, rapidmovan kaj viglan.

Jen la idealo. Kiel efektiviĝi ĝin en la praktiko sur nia pola militfronto?

Antaŭ ĉio, for la izolismo! Ĉiu Esperantisto komprenu, ke li estas kulpa kontraŭ la movado, se li restas neaktiva, neapartenanta al societo, nehelpanta al vera oferejo kaj laŭfoje memforgeso de samideanoj grupiĝintaj kaj kunlaborantaj por la ideo. Sed tio ne sufiĉas. Oni devas senkompatate kontraŭbatali ankaŭ la „partikularismon“, la fortranĉitan vegetadon de tiuj provincaj grupetoj po dek membroj, kiuj apenataŭ spiretas kaj ne interrilatas tute kun aliaj grupigoj, „malhelpante vivi al si kaj al aliaj“. Multaj provincaj grupoj komprenis jam bone la danĝeron de tia stato kaj asociiĝis al la Pola Esperantista Societo aŭ alia pli granda grupigo. Sed ekzistas aliaj, kiuj ĝis nun tion ne faris, la nombro de izolitaj grupoj en Pollando atingas la terurigan kvanton de 20 — kaj iliaj gvidantoj ŝajnas ne kompreni, kiel dolorigajn perdojn suferas ĉiutage nia movado pro tia nekomprenebla pasiveco. Ni prenu nur unu ekzemplon: jam nun ni preskaŭ ne posedas en Pollando lernolibrojn, propagandilojn, literaturaĵojn. No-



vajn neeble estas eldoni pro manko da mono kaj da laborantoj — kaj tiu mono kaj laborantoj facile trov'gus, se ni scipovus konkordigi kaj unuigi ĉiujn apartajn, disjektivajn iniciatojn. Aldonu, ke la eldonota materialo estus ankaŭ tre facile vendebla: en la nuna stato la Centrejo de P. E. S. devas konstante respondi nee al diversaj proponoj de aĉeto.

Sekve: ne multaj malgrandaj grupigoj, sed unu aŭ kelkaj grandaj kun multaj membroj.

La pasinta jaro postlasis al ni bonegan batalilon, bonegan „kunigilon“: la „Pola Esperantisto“. Ĝi renaskiĝis dank'al oferoj kaj penadoj de kelkaj individuoj, ĝi povus esti dekoble pli granda kaj bona, se ĉiuj polaj Esperantistoj subtenus la revuon kaj la Eldonan Sociecon laŭ sia povo. Tamen al la varma kaj kora alvoko venis nur tre malmulte da mono, ankaŭ tre malmulte da literatura materialo. La „Pola Esperantisto“ estas large malfermita por ĉiuj. Ankaŭ por vi, kara leganto, se vi bonvolos preni plumon en la manon kaj kunhelpi nin per la fruktoj de via persona sperto kaj scio. Komprenu, ke la gazeto tiam estos plej utila, kiam ĝi fidele respegulos la tuton de pola esperantista vivo, kiam ĝi farigos ĉirkaŭprenanta kaj radiantan centro de esperanta movado en nia lando.

Tio dependas de vi ĉiuj, samideanoj. Ni fine sciis unuigi! Tiu unuigo estu por ni plej sankta konsciencia ordono en la komencanta periodo de nova jaro. Ni ĉesu konstrui malgrandajn dometojn el sablo, ni starigu nian palacon de esperanta propagando sur solida kaj larĝa bazo, ke ĝin ne disbatu preterpasanta venteto.

En la vicon, soldatoj de Esperanto! Kaj feliĉan jaron al vi!

*Jan Kostecki.*

*El la ciklo:*

## *La pola vilaĝo*

*De unu flanko lovento petola,  
De dua—alta betula arbaro,  
Ĉirkaŭe kreskas da tritiko maro —  
En kles mezo — pirujo isola.*

*La preĝejo kun turo kupola,  
Tie vidigas da dometoj aro  
Kaj apud ili el ston' palisaro —  
Ie aŭdigas la kanto kukola...*

*Dum sublranta jam sun' agonias  
Kaj malaperas lum' abundobrila —  
Tiam ĝi estas plejbela pejzaĝo...*

*Somere, vintre de l'gojo radias,  
Ĉiam senbrua, kvieto, trankvila...  
— Jen simpla bildo de pola vilaĝo.*

## **Rikolto.**

*De la tagiĝo ĝis al sunsubiro  
En la kamparo la laboro bolas;  
Tempo rikolta... ĉiuj nepre volas  
Plej baldaŭ fini; do kun la admiro —*

*Inda moveco, kvazaŭ en turniro  
Sub la falĉiloj sin grajno tavolos  
Kaj en ĝi are cikadoj frivolas...  
Ofte el brustoj aŭdigas la spiro...*

*Tre longe pluvis—nune el sub nuboj  
Plene radias la suno oroza...  
Ili rapidas ĉar temp' estas kara.*

*Antaŭ nelonge grenoplenaj huboj  
Maturaj staris—en stato riposa  
Kaj nun — malplenaj — kvazaŭ spaco mara.*

## **La kverko maljuna.**

*Apud lageto ĝi staras, maljuna  
Tre alta estas, aspektas majeste...  
Abundaj branĉoj kreskas arbaleste  
Kaj diversforme el trunko komuna.*

*Dum la somera, hela tago suna  
Ĝi sin spegulas en lageto — feste  
Verde vestita — kaj dum temp' aŭtuma  
Per sekfolioj flustras manifeste —*

*Kvazaŭ paroli volus kun ekstazo  
Pri pasinteco, pri tempo aŭrora  
Kiun ĝi vidis dum vivado sia...*

*Travivis multon... ne unu okazo  
Antaŭ ĝi pasis... goja an' dolora  
Por pola lando — kara hejmo mia.*

**Eska.**



ANTONI LANGE.

# Raporto de D-ro Ĉang-Fu-Li.

(El la novelaro: „En kvara dimensio“).

*Parizo, en la jaro 2652.*

La scienca ekspedicio al la stranga mondparto, nomata Eŭropo, kien mi estis sendita de la estimata Akademio de Sciencoj en Pekino, donis tiel neatenditajn rezultatojn, ke, se veriĝus la fantaziaj teorioj de la instruita Lapono D-ro Teene Veene, tio estus simple revolucio same en la geologio kiel ankaŭ en la historio.

Kio montris al mi ĉi tie kelkaj laponaj scienculoj, cetere ĉiuj iamaj lernantoj de niaj hinaĵ universitatoj—tio ŝajnas laŭfoje realaĵoj; efektive tamen ĝi estas stranga ludo de l'natur, kiu imitas laŭfoje la verkojn de homaj manoj kaj loĝas mirinde la homajn okulojn kaj intelekton.

Vi, kiuj loĝas en la mirtaj kaj migdalaj arbaroj de Vladivostoko (laŭ ĝia iama nomo) aŭ Lan ding-stong, vi, kiuj spiras la ĉarman odoron de l'siberiaj citronoj kaj orangoj, vi ĉe ne supozas, kiel teruran impreson faras la restado en Eŭropo, kovrita preskaŭ tute per eternaj neĝo kaj glacio. Mi ne supozas, ke la ajn homa raso estus povinta tie ĉi loĝi, esceptante eble Laponojn, Samojedojn kaj Kamĉadalojn, kiuj laŭdire iam enloĝis la nordan parton de nia lando, en Kamĉanka, kaj nur en la XXII jc., en la tempo de l'granda popolmigrado forlasis Siberion—kaj translokiĝis Eŭropon kune kun la renocervoj.

Tio estas sendube legendo, apoganta sin je la antikva fabelo pri Atlantido, kaj disvastiĝis ĝi kune kun multaj aliaj la instruita Lapono D-ro Teene Veene.

Ĉiel ajn la speciala karakterizaĵo de Eŭropo estas la granda disvastiĝo de l'renocervo, kiu estas simila al niaj cervoj, tamen ĉi tie servas kiel ĉe ni la ĉevalo aŭ bovo; do Ĥimerplena D-ro Teene Veene, kvankam li finis la studojn en Pekino, certigas, ke dum sia restado en Siberio li trovis inter la elfosaĵoj la ostojn de la renocervo, kaj asertas, ke iam en Siberio vivis la renocervoj kaj ke la klimato de tiu lando estis same severa kiel la klimato de Eŭropo.

La verko de D-ro Teene Veene, titolita *La glaciaj epokoj de nia planedo* faris grandan impreson, ĉar ĝi estas efektive senekzista *curiosum* en la historio de la scienco;

precipe kelkaj junaj Ĥinoj — (konate la junularo facile entuziasmiĝas) — akceptis la verkon kun granda fervoro, ĉar paradokso kaj strangeco ĉiam trovas adorantojn.

Li asertas nome, ke ankoraŭ antaŭ sepcent jaroj, t. e. en la unua duono de l' XX jc. Eŭropo havis klimaton tre moderan, ke ekz. en Roma Kampanio floris migdaloj, citronoj kaj eŭkaliptoj, kiel ĉe ni en Vladivostoko; ke laŭdire Romo estis iam potenca imperio, ke la Romanoj kreis la juron (l?), ke Parizo (tiu ĉi glacia dezerto) estis metropolo de granda Respubliko kaj ke ĉi tie ankoraŭ en la XVIII jc. estis proklamita t. n. Deklaro pri la rajtoj de l' homo.

Tiel parolas D-ro Teene Veene, tamen ĉiu Ĥino bonege scias, ke la efektiva fonto de ĉiuj juraj ideoj en la mondo estis kaj ĉiam restos Ĥinujo; ke tie por la unua fojo en la XX jc. oni proklamis la esencajn ideojn pri la libereco de l'homo kaj ke tie ankoraŭ ekestis la unua Respubliko sur la globo.

Cetere mi ne polemikos kun la tiel ridindaj asertoj, kiel estas la anoncataj de S-ro Teene Veene. Ankoraŭ pli strangajn aferojn li rakontas al ni pri la ŝanĝo mem de l'klimato en Eŭropo kaj Siberio—kaj certigas, ke kaŭzo de tiu ĉi aperaĵo estis la homo mem, kiu troe kuragiĝis kaj intencis aligi la terglobon, ne kalkulinde antaŭe ĉiujn eblaĵojn.

Kiel ĝenerale estas konate, Romo troviĝas en la sama geografia latitudo, kiel Vladivostoko. Naskiĝas do la malkvietiga demando: kial Romo estas tiel kovrita per glaciejoj, senhoma kaj senfrukta, se Vladivostoko havas la klimaton tiom varman, ke oni povas tie kulturi la oranĝojn kaj ke eĉ la daktiloj prosperas? Evidente la klimato decidas pri la ebleco aŭ neebleco de la kulturo; kian do kulturon povas havi Laponoj aŭ Samojedoj, loĝante en la lando tiel malvarma kaj senfrukta, kiel estas la dezerto Pariza aŭ la glaciejoj de Romo? Respondo simpla — tre malriĉan kaj mizeran. Cetere depost pli malpli cent jaroj devastiĝas ĉi tie la Ĥina civilizo, kompreneble en maniero limigita per la klimato.

La sekreto de tiu laŭdira ŝanĝo de l'klimato en Eŭropo kaj en Siberio rezultis — kiel rakontas D-ro Teene Veene—de tio, ke en la komenco de l'XX jc. oni trafosis en la Meza Ameriko grandan kanalon Carraba, kiu ekzistis ĝis nun kaj bonege servas al Ĥinujo: ĝi mallongigas nome la vojon al Afriko, ebligata de sufiĉe civilizitaj popoloj de Blankonegroj; kiel estas sciate, la nordo kaj okci-



dento de Afriko estās nia kolonio, dum kiam la sudon kaj orienton ekposedis Japanoj.

Eŭropo havis iam en certa distanco de siaj bordoj varman fluon nomatan Golfŝtrem: ĝi iris de la Meksika golfo al Norvegujo, varmigante tiamaniere la tutan nord-okcidentan Eŭropon, kiam la sudan varmigidis la afrikaj ventoj.

Laponoj, Samojedoj kaj aliaj gentoj loĝis en la plej malproksima nordo, kie ankoraŭ povis libere vivi la renocervo.

En aliaj landoj vivis formortintaj nacioj kiel Angloj, Francoj, Germanoj, Italoj k. p. t. La posteuloj de tiuj popoloj, pelataj de malvarmo elmigris en Afrikon kaj Amerikon. Ili estas popoloj de speciala laktokafa koloro, kvankam nia stranga Lapono asertas, ke ili estis iam pli blankaj ol eĉ ni, Hinoj (!?).

Laudire ili estis tre civilizitaj. D-ro Teene Veene trovis (oni ne ridu!) en la elfosaĵoj de Parizo glaciĝintajn objektojn, kiuj degelinte montriĝis libroj (jes!). Krome povus ŝajni, ke tiuj fabelaj loĝintoj de Eŭropo havis la alfabeton, konsis la presarton kaj eĉ verkis librojn!

Jen, kion signifas pensi per analogio. Koncerne la alfabeton, do stranga afero — ĝi estas nia propra hina alfabeto, per kiu mi skribas ĉi tiun leteron, kaj en kiu oni presigas niajn librojn, trovita en la XX jc.

Kun la kutima por frenezuloj konsekventeco diras D-ro T. V., ke li ekkonis la lingvon de l' mortintaj Parizanoj; ĝi estas efektive simila al la lingvoj de kelkaj afrikaj grupoj de Blankonegroj, tamen iom alia, kvazaŭ pli pura kaj pli riĉa. Mi opinias simple, ke D-ro T. V., al kiu oni ne povas malkonfesi riĉan fantazion, laŭ la lingvo de Blankonegroj *fikciigis*, tiel mi diru, ian laŭdire elfositan lingvon de l' mortintaj Parizanoj. Ĝi estas verŝajne lingvo devenanta de la mongola; efektive, mongole ekz. „enam ĝinta“ signifas *amurai, parise: amoureux*. Se do tia lingvo efektive ekzistis, oni devus ĝin alkalkuli al la grupo de la mongolaj lingvoj.

Tamen ni revenu al la plej grava afero. La trafosado de l' kanalo Carraba elvokis unu efikon neesperitan kaj neantastivitan de la konstruintoj de tiu—kiel oni iam parolis—ĉefverko de l' ingenera arto.

Nome la varma akvo de l' meksika—norvega fluo komencis traflui de l' Atlanta oceano en la profundulojn de l' Pacifiko—komence en malgrandaj kvantoj, poste tamen ĉiam pli—tiel ke post cent jaroj—pli malpli ĉirkaŭ la j. 2050

la eŭropa Golfstrem tute malaperis kaj, oni povas diri, glaciĝis. Landoj iam varmaj, kiel Irlando, Anglujo, Skandinavio, Germanujo k. t. p. senigitaj de la ondoj de l'varma fluo—komencis malrapide, malvarmiĝi, glaciĝi, ĝis ili tute formortis kaj fariĝis ejo de eternaj neĝoj kaj glacioj; iom poste Iberio, Francujo, Italujo — varmigita dum la tempo per la spiro de l' afrikaj ventoj — ankau subiĝis al la frostaj fluoj de l' Atlanta oceano kaj ankau rigidigis kaj glaciĝis.

Eĉ Afriko malvarmetiĝis.

Norda Eŭropo fariĝis tute nelogebla por la homo; blankaj ursoj tie frostotremas.

Do la loĝintoj de norda kaj meza Eŭropo foriris Afrikon. Ursoj grandaparte lokigis en Ĥinujo, kaj Italoj kaj Hispanoj fornaĝis en sudan Amerikon.

En la 2150 jaro Eŭropo fariĝis dezerto; restis sole Laponoj kaj parencaj popoloj ĉudzaj, por kiuj tamen la norda klimato fariĝis tro severa. La ĉevaloj kaj brutaro, kies ostoj laŭdire miloble troviĝas en Eŭropo, plene formortis — kaj kiel sola besto restis tie la renocervo, kies tombejon laŭ la aserto de D ro T. V. oni trovas en Siberio.

Laponoj elmigris el la malproksima nordo kaj lokigis en Francujo, Italujo kaj Hispanujo, kie dum ses semajnoj en la jaro daŭras pli varma sezono, tiel ke la glacioj iom fandigis kaj kelkloke eĉ malriĉa verda herbaro elkreskas el la tero.

Ĉefurbo de Frankolaponoj estas Parizo, kuŝanta en plena je strangaj montetoj Pariza dezerto, kie troviĝas apartaj fenomenoj, precipite alta je tricent metroj konusforma monto nomata Eifel, tute kovrita per glacio; en ordinara sezono ĝi aspektas kiel grandega stalagmito el glacia kristalo, afero en tiaj dimensioj nenie videbla; tamen en la pli varmaj tagoj, kiam la glacio supraĵe degelas — oni vidas tra ĝia travidebla vitro kvazaŭ arkajon kalkulita konstruo.

Tiu ĉi aperaĵo ĝis nun ne estas klarigita de nia Akademio de Sciencoj en Pekino—sola institucio destinita por esplori kaj difini misterojn. Kompreneble tio, kion parolas D ro Teene Veene, ke ĉi tiu glacimonto estas verko de homaj manoj kaj ke ĝi estas simple turo konstruita de iamaj loĝantoj de Neolaponoj—estas fantazio, kiel multaj aliaj de tiu ĉi scienculo, ne meritanta eĉ la plej malgrandan kredon.

Aliflanke asertas D ro T. V., ke antaŭe Siberio gustehavis tiel severan klimaton, kiel hodiaŭ Eŭropo, kaj eĉ pli



severan, dank' al la malvarmaj fluoj de la norda poluso. Do en la daŭro de l' XXI jc. ĉiu varma akvo de l' eŭropa Golfŝtrem tra la kanalo Carraba trafluis de la bordoj de l'Atlanta oceano en la Pacifikon al la bordoj de Siberio—kaj malrapide ŝanĝis ĝian klimon tiel, ke en la komenco de l' XXII jc. Vladivostoko havis la klimaton de antaŭa Italujo kaj Romo fariĝis tio, kio estis iam Vladivostoko.

Sur Kamĉatka floras nun migdaloj kaj olivujoj; en la Jakuta tero trifojajn dum la jaro okazadas la grenrikoltoj, kaj la oranĝoj kaj vino de Bajkalo estas famaj en la tuta mondo.

En Siberio estis iam la renocervoj, tamen ili aŭ formortis kiel la ĉevaloj en Eŭropo aŭ forlasis la varman Siberiajn landojn kune kun tiuj gentoj, kiuj ilin hejmentis kaj kiuj sen la renocervoj ne povas vivi. Tiuj popoloj — Jakutoj, Tunguzoj, Manguroj, Kamĉadoloj k. a.—translokiĝis en la glaciĝintan Eŭropon kaj komence loĝis en la norda Rusujo kaj norda Svedujo kaj poste ankau elmigris en Neolaponujon, Novan Samojedujon kaj aliajn landojn sude de tiu glaĉa regiono.

Tiel pli malpli prezentas sin la hipotezo de l'instruita Lapono—sendube tre kuraĝa, sed havanta ĉiujn ecojn de fantasmagorio.

Tiu scienculo asertas, ke en la monatoj julio kaj aŭgusto, kiam la glacioj iom degelas, montriĝas, ke tiuj montetoj de la Pariza dezerto tute ne estas montoj, sed de la homoj konstruitaj domoj ruiniĝintaj; oni trovas tie brikojn, objektojn el vitro, metalo, ligno kaj aliajn ŝtoniĝintaĵojn. Laŭŝajne Parizo estis iam urbo ne malpli granda ol Pekino.

Kiom nehaltigebla estas la impeta forto de l'unufoje ekmoviĝinta fantazio—tion pruvas la plej amuza el ĉiuj asertoj de l'estimata seĝulo lapona, kiun mi ĉi tie metas kiel finon. En tiuj laŭdiraj libroj, verkita en la duono de l' XX jc. estis ĵus antaŭ la realigo de l' plej granda reformo, kiu ekzistis de post la komenco de l' mondo: antaŭ la solvo de la sociala demando. Ke ĝuste kiam komenciĝis la konstruado de l' fundamentoj por tiu granda sociala ŝanĝo—la tero en Eŭropo subite komencis malvarmiĝi, la meza temperaturo jara komencis malaltiĝi (ĝis 3, eĉ 2 gradoj cels.)—kaj ĉiu iniciato en tiu ĉi gravega demando estis paralizita.

Ĉi tie D-ro T. V. atingis la ekstremajn limojn de fantazieco. Kia ja ideo povas naskiĝi en tia klimato? Ce-

tere, ĉu ĵa povis tiuj fabelaj Parizanoj ekpensi eĉ pri la ebleco solvi tian problemon, se ni, filinoj, en nia klimato, kun nia disvolvigo industria kaj nia multeco de l' loĝantaro ĝis nun ne solvis tiun demandon — kaj malgraŭ la reformoj de l' jaroj 2437, 2531 kaj 2580 — troviĝas apenaŭ ĉe ĝia sojlo. Ĉar evidente estas, ke tiu dolara batalo, daŭranta depost la komenco de l' historio inter la riĉa kaj malriĉa klasoj — postulas la solvon kaj estos iam solvita, se ne en niaj tempoj — do en la XXVIII aŭ XXX jarcento. Tamen ne tiu legenda Atlantido ĝin solvos, sed nia granda patrujo, la Ĉiela Respubliko. Hinuĵo — la efektiva luŭlo de ĉia homa progreso kaj de ĉiuj liberecaj ideoj.

*Kun la permeso de l' aŭtoro  
el la pola lingvo tradukis Br. Kuhl.*

## Mankoj en nia propagando.

Opiniante, ke nia ĝisnuna propagando enbavas mankojn, mi provis ilin montri kaj prezentas ilin por diskuto en la esperanta gazetaro.

### 1. La neelprofitita malkonsekvenco de la adeptoj de nacia lingvo kiel universala.

La personoj ne konantaj nian ideon, aŭ konantaj ĝin ne sufiĉe, opinias, ke iu natura lingvo, kiel franca aŭ angla povus anstataŭi Esperanton. Kontraŭ tia argumentado plej bona rimedo estus permesi al ĝiaj adeptoj disvolvigi ĝin, instigi, ke ili tion provu efektiviĝi, organizi la enketon ĉu aliaj ŝtatoj, precipe Germanujo volus akcepti francan lingvojn kiel helpan; de la favorantoj de angla, vi postulu la saman. Tiam la ideo per si mem fariĝas klara. Neniam pli rektan vojon ni povas deziri, por fine disblovi la iluziojn pri monda akcepto de iu nacia lingvo. La plej danĝera tamen por ni estus, se oni le ajn volus decidi, ke iu nacia lingvo ekz. franca, aŭ angla estu akceptota, kiel helpa kaj internacia, kaj nenion fari, por ke tiu ĉi bondeziro fariĝu realeco. De pli ol tri jarcentoj ni konstatas la tendencon, ke franca lingvo fariĝu universala, kaj neniam pli malproksime de la realigo de tiu ĉi tendenco estis la homaro el nun. Sekve, se en iu konferenco de Ligo de Nacioj oni postulus ke iu nacia lingvo fariĝu universala, oni tuj devus demandi, kion oni volas fari por tiun-ĉi deziron efektiviĝi. Se por ĝia efek-



tivlgo oni kunvokos ĉirkaŭ la sama tablo la reprezentantojn de la diversaj nacioj, tiam certe montrigos, ke, kiel oni povis kvar jarojn gvidi la militojn per la nacioj de aŭstro-hungara monarkio, sed oni ne povis, ilin kontentigi, kiam oni volis krei novan landkarton,—simile oni longe povas kontriiŝtarigi al nia projekto la projekton pri universaleco de franca lingvo, sed oni ne povas tiun-ĉi proponon levi ĝis la principo, ĉiujn naciojn oficiale deviganta.

## 2. Universalaj fakaj kongresoj.

### a) *pligrandigu la multlingvecon!*

*La plej malfacila tasko estus devigi la personojn pensi pri la problemo de helpa lingvo.* Se unufoje oni devigus la homojn pensi pri ĝi, ili certe pli aŭ malpli frue trovus la rektan vojon al nia ideo. Nenle pli oportune oni povas montri tiun-ĉi neceson de helpa lingvo ol dum la kunvenoj kunigantaj la diversajn naciojn. Aljare okazas serio da universalaj, „tutmondaj“, aŭ pli modeste mondaj, fakaj kongresoj. Nia tasko devus esti komplikigi iliajn malfacilaĵojn, por ke ili fariĝu des pli videblaj. La rekta vojo gvidanta por tiu-ĉi celo estus instigi la ambiciojn de diversaj naciaj reprezentantoj, por ke ili postulu, ke oni permesu al ili raportoj nacilingve, kaj ankaŭ presigi siajn prelegojn en la kongresaj raportoj. Ju pli multe estos da tiaj komplikadoj des pli rapide aperos la urĝa neceso de helpa lingvo. Tial ni devas subteni la principon, ke kiel eble plej granda multeco da naciaj lingvoj estu reprezentota dum la mondaj, fakaj kongresoj, aranĝotaj dezirinde en multlingvaj ŝtatoj.

### b) *Prezentu Esperanton praktike!*

Krom tion ni devas havi inter ni ian grupon de personoj, kiuj bonvolus esplori la serion de la universalaj kongresoj okazantaj en ĉiu jaro. Dum ĉiu-tia kongreso ni devas zorgi, ke nia reprezentantaro prezentu la proponon ke inter diversaj lingvoj estu akceptota ankaŭ Esperanto kaj agi same ĝis la fina akcepto de la kongreso. Se ĉiu kongreso decidus enkonduki Esp. kiel unu el la kongreslingvoj, tiam ni plue devas zorgi ke por ĉiu kongreso estu sendita nia esp. delegito, kiu parolos esperante, ne pri Esperanto, sed pri faka temo interesa por la kongreso. Pri la sendado de tiu-ĉi delegito devos zorgi la fakaj esp. asocioj. Se ili tion-ĉi ne povus fari, tiam oni devus ilin

subteni el ĝenerala esp. organizo, impostigante Esperantistaron por tiu-ĉi propagando. Cetere la financa flanko de tiu-ĉi propono estas ankoraŭ pripensinda.

Tiamaniere ni malrapide, sed konstante enpenetrados en la internacian vivon, en tiaj momentoj kiam ĝi plej videble centriĝas.

### 3. Koncerne aliaj lingvoprojektoj.

La neesperanta publiko, ekscitante ke ekzistas esperantistoj, idistoj kaj ankaŭ adeptoj de aliaj lingva projektoj ofte diras: ili interkonsentu reciproke, kaj poste venu al ni! Ni tre erarus, se ni opinius, ke tiu diro estas sincera. Se ni estus solaj, aŭ solaj restus, kun ni tiuj ĉi personoj ankaŭ ne volus diskuti, sed ili motivigus sian konduton alimaniere. Nun ili nur profitas, ke ekzistas aliaj lingvoprojektoj, por havi pretekston por ne diskuti pri tio.

Por nuligi la bazon de tiuj-ĉi pretekstoj ni devas adopti jenan taktikon. Nia lingvo (Esp. Zamenhofa) neniel povas ion perdi, se ĝi akceptos en sian vortaron novan kvanton de la terminaro, kiun adoptis la Idistoj, kun ŝanĝo de la finigo kaj de la ortografio, sen la ŝanĝoj gramatikaj. Tiam fenomenon de pligrandigo de la vortaro, ni vidas en ĉiuj naciaj lingvoj, kaj se la terminaro faka, adoptita de Idistoj estas bona, kaj se esperanta mankas, aŭ ne estas kompleta: kial ĝin ne enkorpligi en nian vort-trezoron. Idistoj nenion povas kontraŭi tio al ni riproĉi, ĉar ni povas ĉerpi el la sama fonto, kie ili ĉerpis por la esprimoj internaciaj, eventuale mankantaj al ni.

Rilate al publiko neŭtrala por nia ideo, ni gajnos per tiu-ĉi taktiko, ĉar kiam oni nin instigos al interkonsento kun adeptoj de aliaj lingvoprojektoj ni respondos: 1) kio estis bona en ilia terminaro, ni tion jam akceptis, 2) la gramatikon ni ŝanĝi ne bezonas, ĉar la praktiko montris, ke la ĝisnuna Zamenhofa sufiĉas kaj eĉ estas pli bona, 3) teorie se ni eĉ konsentus ke diversaj finigoj, aŭ la ortografio en la detaloj povus esti alia ol nun, ĝuste tial ni ne vidas bezonon ŝanĝi la ĝisnunajn, ĉar ĉiu persono alian volus havi finigaron, kaj la diskuto fariĝus senfina, detruus nian ĝisnunan esp. literaturon, kaj postulus kreon de nova, pri kia certe zorgus nek idistoj, nek la neesperanta publiko, kun siaj pedagogiaj gestoj, kaj kiu neniel nin helpus en la laboro.

Dum la diskuto pri Esp. kaj aliaj projektoj ni substreku la organizan forton de niaj vicoj. Aliaj projektoj aŭ ne scias tiel organizi la vicojn de siaj adeptoj, aŭ ĝe-



nerale ne organiziĝis, atendante eble de la ŝtatoj, la fortojn kiuj mankis al ili por organizi la lernejojn, kie ili ankoraŭ ne sciopovis enpenetri ĉe parte.

#### 4. Elekte de la ŝtatoj por la universalaj esperantaj kongresoj.

En la elekto de la landoj por la venontaj kongresoj universalaj de Esp. devas regi la principo. Ni elektu antaŭ ĉio la landojn, kie oni povas esperi, ke en tiu aŭ alia formo Esp. havos influon al ĝia lernejararo. Oni devas prepari la favoran agordon por ke la ministerio, aŭ parlamento povu subskribi la „Genevan Akordon“ (ni enkondukos Esperanton en la lernejojn, se aliaj ŝtatoj enkondukos ĝin), kaj kie post la kongreso oni certe tion faros. Estus tre dezirinde, ke la kongreso pova kompletu, aŭ per ĝia delegacio manifesti por tiu ĉi Geneva Akordo petante la ministrojn aŭ ŝtatestrojn, ke ili subskribigu la Akordon. Tiu ĉi peto subtenita per la kunveninta Esperantistaro havos tiam pli grandan influon, ol antaŭ, aŭ post la kongreso. Ŝajnas al mi, ke la propaganda flanko de la kongreso ne estas sufiĉe uzita kontraŭ la neesperanta publiko. Se iu lando volas ĉe si gastigi Esperantistaron, ĝi tion faru por ĝi kaj unu el la plej agrablaj donacoj por ni estas subskribigi la Genevan Akordon.

*Dr. Antoni Czubryński.*

## Solve nenion solvanta.

La Prezidanto de l' „Esperantista Akademio“ proklamis *urbi et orbi* la decidon pri la landnomoj!

La dekdokapa papo je l'demando: „Ĉu konsilinda la simpla fideleco al la Fundamento kaj tradicia—uj?“ respondis per 9 voĉoj: jes; du kapoj opinis nee, unu havis iajn dubojn. La kolegio de kardinaloj, kiun en niaj rilatoj prezentas la Lingva Komitato, per 74 voĉoj (por 87) aprobis ĉi tiun sintenadon de l'papo. Tiel finiĝis la kelkjara milito de uĵistoj kaj ianoj per la fina kaj senduba (?) malvenko de tiuj lastaj; la neintaj du Akademianoj kaj kvin L. K.-anoj havas nenian eliron, nur aŭ submetiĝi obeeme aŭ... transiri al la Idistoj, kiuj estas tre oportuna deflujo de ĉiuj malkontentuloj; kora akcepto estas tie garantiata.

*Roma locuta, causa finita!*

Ĉu tamen finita?

La tri dubaj voĉoj—unu Akademia kaj du L. K.-anaj—estas en tiu rilato tre pripensindaj. Ili montras, ke troviĝas en nia aŭtoritata aro — oni klarigu al si ĉiele la vorton „aro“ laŭvole: simple aŭ alegorie — homoj pensemaj, kiuj opinias: ke por esti akademiano, ne sufiĉas voĉdoni jese al tiel starigitaj demandoj.

Ĉar kion solvis la voĉdonado pri la landnomoj? Ĉu nun malaperos la haoso de du kaj trioblaj nomoj geografiaj? Ĉu ni simpluloj, ne legintaj la raporton de prof. Grosjean-Maupin, scios, kiel paroli: Aŭstrio aŭ Aŭstrujo, Brazilujo aŭ Brazilo aŭ eĉ, kiel deziras la prezidanto de L. K., Brazilo (S-o Cart estas franco, france tiu lando estas nomata Bresil—do Brazilo, cetera.. Brazilo tro rememorigas la abomenindan—i'sufikson!) Ĉilo aŭ Ĉilio aŭ Ĉilujo, Ukraino aŭ Ukrainujo. Felice Montenegro malaperis de la landkarto de Eŭropo, ĉar oni ankoraŭ nun havus dubon, ĉu ne paroli Montenegrojo. Kaj felice Ĉeĥoj sangis sian nomon, ĉar la haoso estus ankoraŭ pli granda: Bohemoj ili volis sin nomi kaj sian landon Bohemujo, sed kontraŭ tio protestis loĝantaj en Bohemio en sufiĉe konsiderinda procento Germanoj, cetere Bohemo france signifas: cigano — tiu solida nacio neniel dezirus esti opiniata cigana; Ĉeĥoj ili ne volis esperante esti nomataj, kvankam tiel ili sin nomas en sia propra lingvo, ĉar germane „Tscheche“ sonas tom malsate—la plej bona solvo estis do alpreni la nomon Ĉeĥoslovakio — restas nur demando, ĉu ili Slovakiojn tre kontentigis, sed tio estas jam ilia interna afero. Felice ankoraŭ estas, ke unu el la plej grandaj kaj gravaj en Eŭropo nacioj estas tiel modesta kaj malfiera, ke ĝi indiferente toleras, kiam oni ĝin en preskaŭ ĉiu lingvo alimaniere nomas: germane - Deutschland, france - Allemagne, itale - Tedeschi, ruse - Germanci, pole - Niemcy, esperante - Germanoj. Tamen en granda embaraso troviĝas nacio reprezentata en la Lingva Komitato de S-oj Bulthuis kaj Uitterdyck: ĝi ne scias, kiel ĝi sin nomas esperante: mem ĝi preferus nomi sian patrujon Nederlando (tial aperadis Nederlanda Esperantisto) kaj la prezidanto ĉikanas ilin per Holando — sed ĉi tie ne finiĝas ankoraŭ ilia ĉagreno: — land' estas anstataŭigilo de—uj', do oni povas ankoraŭ diri: Nederujo aŭ Houjo kaj la anojn de tiu nacio nomi laŭ la konata principo pri sufiĉo: Nederoj aŭ Hooj! Ĉu ne?

Ĉi tio estas ŝercoj — eĉ malspritaĵ ŝercoj — sed la ebleco de similaj ŝercoj montras, ke ne ĝuste oni agis, kiam „post raporto de prof. Grosjean-Maupin, la Akademio, flankenmetante aliajn proponitajn solvojn, al la de-



mando: „Ĉu konsilinda la simpla fideleco k. t. p.“ generale per voĉdonado respondis.

Kial oni „flankenmetis aliajn proponitajn solvojn“, kiuj verŝajne, se ne plene, tamen almenaŭ grandaparte estus forigintaj la dubajn kazojn. Ĉu vere en ĉi tiu problemo la plej esenca estis la flanko kaj indiferenta demando pri-uj' aŭ i'?

La voĉdonado estis aranĝita en imageble plej faciligita sed malplej objektiva maniero: anstataŭ preni sub konsideradon geografion, historion, tradicion, lingvosciencan, individuajn preferojn kaj multajn ankoraŭ aliajn problemojn, oni eltenis el magazeno de Akademias rekvizitoj la imponan kanonon de Sijna fideleco kaj pafis... forgesinte tamen antaŭe ĝin ŝargi. Tial eĉ truen en la aero oni ne faris.

Sed ne — truo povos esti. La decidoj de nia Sinedrio havas ĝis nun preskaŭ tradicion bonŝancon esti obeataj — inverse: sufiĉas, ke io falu forĵetita de la tablo Akademia, por ke la popolo ĝin levu kiel plej grandan frandaĵon. La samo povos okazi nun: La akademio opinis konsilinda simplan fidelecon kaj tradicion, la Lingva Komitato aprobis la fidelecan sintenadon de l'Akademio, kaj la Popolo admiras la fidelecon de l'Akademio, laŭdos la tradicion de l'Lingva Komitato kaj lojale uzados — i', konservante la fidelecan tradicion por penseble malplej ĝustaj okazoj.

Ĉar oni devas koni la Popolon!

Mirinde nur estas, ke inter 99 eminentuloj troviĝis nur tri, kiuj antaŭvidis tiel grandiozan rezulton.

*Baroko.*

## Historia resumo de niaj kongresoj.

De la jaro 1905, regule kaj seninterrompe ĝis 1914 iu grava urbo de Eŭropo gastigis Esperantistaron, kiun venigis el ĉiuj mondpartoj la Esperantistaj Universalaj kongresoj. Multaj el niaj samideanoj ne estas informitaj pri tiuj, tiel propagande gravaj faktoj de nia historio, sekve de kio mankas al ili gravegaj argumentoj por propagando. Por ili ni resumos la historion de tiuj Universalaj kongresoj.

*Boulogne sur-Mer.* (Bulonjo apud Maro) 1905! Tiu per si mem ne tre grava franca urbo akiris tiam grandegan signifon en nia movado. Tie, vere, dum kelkaj tagoj

Esperanto naskiĝis, kreskis, ekfloris. Tie, Esperantistoj venintaj el plej diversaj landoj; veraj koroj kaj cerboj de Esperanto, atendis, emocie tremantaj, la solvon de dubo obstina, konstante forpuŝata, kaj konstante renaskiganta kvazaŭ el siaj cindroj! „Ĉu tamen ni komprenos unu la alian anoj el malsimilaj lingvoj?“ Ili estis tie 500!... kiuj laboris kiel 5000! la pioniroj, ĉirkaŭ la Majstro. Ili scis, ke la mondo rigardas ilin, preta moki senkompatate pri malsukceso. Ili estis kuraĝaj, ili tamen fidis.

Tiuj samaj, kiuj venis por moki skribis entuziasmajn artikolojn, kiam ili konstatis la emociajn larmojn, kiuj tremetis ĉe la okulrandoj de blankharaj scienculoj, same kiel ĉe tiuj de entuziasmaj junuloj. Oni ludis en Esperanto la komedion de Molière: Edziĝo kontraŭvola, kaj ĉiu aktoro estis el malsama nacio. La ĉefdokumentoj pri tiu kongreso estas la emociplena parolado de la Majstro, deklaro pri Esperantismo, kreo de Lingva komitato por konservi unuecon de la lingvo, projekto de la Majstro pri Internacia Esperantista Ligo, kaj la belega poezio: Preĝo al Verda Standardo. D-ro Zamenhof ricevis de la franca registaro la Honoran Legion. — En 1906 Genevo, gastigis la kongreson, kaj al 600 personoj prezentis Esperante sian nacian kvazaŭ epopeon: Vilhelmo Tell. — En 1907, en malnova kaj interesa Universitato de Cambridge (Kembrig), la nombro de la kongresanoj kreskis ĝis 1350. Grandioze la Britoj akceptis la vizitantojn kaj prezentis al ili en Esperanto verkon de Dickens. — En 1908 la Saksa Reĝo patronis la kongreson en Dreseno, 1400 personoj ĉeestis. Tie, la unuan fojon, veraj, famaj geaktoroj ludis en Esperanto la mondfaman verkon de Goethe: Ifigenio en Taŭrido, tradukita de la Majstro mem. Tiu estis neforgeseble emociga por la ĉeestantoj. — 1909! Barcelono! Malkvieta momento en la historio de la Iberia duoninsulo. Tamen la urbestro de la bela katuluna urbo, la ministroj, la reĝo mem montr'gis gastamaj por la 1250 esperantistoj, kiuj vizitis ilin. Poste Valencio ankaŭ ple akceptis la postkongreson. La reĝo Alfonso la 13-a donis al la Majstro la ordenon de Izabelo la Katolika; oni ludis teatraĵojn: Mistero de Doloro, de Adria Gual. — 1910, Washington. Tien veturis el Eŭropo nur malmultaj personoj, tial ĝi fariĝis kongreso de specialaj delegitoj, traktita de la granda Respubliko kiel ĉiu scienca kongreso! — 1911. La arta kaj malnova flandra urbo, la grava norda haveno Antverpeno tremis pro entuziasmo kiam ĝi akceptis la 1750 Esperantajn delegitojn sur la Skeldo. Tie ankaŭ la teatra parto estis verko de nacia



poeto, Paul Spaak: Katje, kiu havis merititan sukceson. La franca firmo Gaumont filmis kaj prezentis la kongresanojn ekskursantaj sur la Skeldo. Tie la Majstro ricevis la ordenon de Leopoldo.—1912, Krakovo! la perlo de ĉiuj kongresoj laŭ intimo, bonkoreco. Vera familia akcepto de rehezmitanta infano! Neniu povas ofendiĝi je tia diro, ĉar laŭ ĉiuj kongresorganizintoj, kiuj ĉeestis tiun ĉi, ĝi estis senkompara pro la sincera gastemo de tiu historia, malnova pola ĉefurbo.

Moniuszko—Halka—Słowacki—Mazeppa—la famaj geaktoroj—Wawel, la bela pola Panteono,—La hejnalo, kies sonoj ĉiuhore flugis el la turo de la katedralo, konstanta novaĵo, konstanta admiro. La riĉaj kaj tiel kuriozaj salminejoj en Wieliczko (Vieličko). La fama esperantista pola poeto salutanta je la nomo de Pollando la 1150 vizitantojn. Unu semajno de entuziasma, kvazaŭ reva vivo! La lastan fojon la Majstro sidis *inter* la kongresstraro: de tiam li fariĝis nur *unu-el*.—1913, La duan fojon Svislando invitas la kongreson. Tiun ĉi fojon en sia ĉefurbo: Bern, ĝi gastigas ĝin, ĝi montras al la kongresanoj sian belan altlandon kun siaj eternaj neĝoj. Plej forta kongresa impresio: en la kazino, dum malferma kunsido nia himno ludata majstre sur orgenoj laŭ imita muzikludo, streĉigis tiom la atenton kaj la sentojn de la aŭstultintoj, ke ili eĉ ne povis aplaŭdi kiam ĉesis la ludanto. Nur post almenaŭ unu minuto oni ekaplaŭdis kaj petis „bis“!

Grandiozajn preparojn por akcepti la 10 an faris en Paris la Francaj Esperantistoj, en 1914. La subita eksplodo de la terura uragano, kiu dum kvin jaroj disŝiris la mondon, nuligis tiujn penadojn kaj esperojn, kiujn partoprenis tiom da eminentoj homoj el ĉiuj klasoj, fakoj, opinioj! La tiama franca ministro pri Publika Instruado, fama sciencisto estis salutanta la kongresanojn per interesplena parolado\*). En la brila, lukse ornamita „Gaumont Palace“, la plej vasta kaj grandiozaejo en Paris, naciaj flagoj montris al ĉiu nacio sian lokon! La urbestro, kaj ĉiuj sociaj kaj sciencaj asocioj preparis entuziasman akcepton al siaj gastoj. Liceoj, kolegioj, teatroj estis je ilia dispono. Poŝtoŝicejo, bankoj kreis esperantajn sekciojn. Al tiu kongreso aliĝis 8739 personoj el 42 landoj. Flagoj jam flutis ĉie. Sed, va, okazis nur unu kunsido... malferma kaj ferma samtempe... la 2-an de aŭgusto 1914 je la 20-a horo.

---

\*) Publikigita en la raporto eldonita de Esp. Centra Oficejo en Paris.

Estis necese adiaŭl la *revojn* por sin dediĉi al pli prozaj kaj urĝaj agadoj...

La 11-a kongreso estis okazonta en Edinburgo! lando de Walter Scott! kaj de tiom da viglaj gesamideanoj. Jam antaŭe gojis multaj Esperantistoj pro la fame konata gastemo kaj organizemo de la Skotoj. Anstataŭ tiu ĉi, tamen, pro la tiama Eŭropa situacio, la Novkontinentaj Esperantistoj akceptis la taskon organizi kongreson en malproksima kaj luma San Francisco, en 1915. Oni ankoraŭ esperis savi la seninterrompan vicon de la kongresoj! Oni do nomis ĝin la 11-a, por lasi la iluzion pri la tiel kompatinde enŝele mortinta 10-a.

Tamen, dum kvin jaroj la Esperantistaro simple pagis sian tributon al socio verŝante abunde sian sangon en ĉiuj anguloj de Eŭropo. Multege da junaj entuziasmoj movigitaj iam per ĉio bela kaj bona kuŝas nun por ĉiam sub malvarma, peza sed amata tero de la patrolando! Multaj, ve, kuŝas sub fremda tero. Doninte al ili niajn larmojn kaj pensojn, konservante danke kaj ple ilian memoron en niaj koroj ni daŭrigas nian vojon penante ilin anstataŭl per duobligo de niaj agadoj.

En tiu penso agis en 1920 la iniciatintoj de la 12-a kongreso. Sur tero, kiun feliĉe ne tuŝis la sangavida hiltero, tero sur kiu tiom da kompatindaj viktimoj trovis konsolon, sur Nederlanda tero, en Hago, 400 kursguloj revivigis la tutmondajn, kunvenojn, kie estas traktataj tiom da temoj diversaj, ne nur interesaj por Esperantistoj sed por ĉiuj pensantaj homoj. (Tie eksplodis kvazaŭ fulmo la ideo tiel longe timeme prilaktata en gazetoj, la ideo prezentita de la Majstro en Boulogne sur Mer: pri internacia organizo. Oni nomis studkomisionon por prilabori projekton).

La enlandaj aŭtoritatoj tioakze organizis ŝipekskurson tra la famaj „polders“ (lando preskaŭ tute subakvigita, kaj kiun oni povas eksploati nur dank' al senĉese funkciantaj pumpiloj. Alian ekskurson al la belaj, historigardantaj insuloj Marken, en la Zuidersee. Firmoj kinematografaj filmis kaj prezentis la kongresanojn dum la kongresa semajno. En teatro oni ludis historian epizodon de la liberigo de la lando. La sekvantan jaron, en Praha, la 13-a kongreso kunvenigis 2300 esperantistojn el 32 nacioj. La Ĉeĥoslovaka registaro, kaj ĉiuj organizoj, subtenis ĉiunmaniere la kongreson donante al la gastoj la eblon viziti oportune la belajn kaj riĉajn de sia lando. Memorindaj por ĉiuj estas la lumaj grotoj de Moravska karsto. Instrua



por ĉiuj estis la vizito al Nord-bohemaj banurboj. En teatro oni prezentis verkon de fama nacia verkisto Vrchlicki „Nokto en Karlův Štín“.

Fine dum aŭgusto lasta, en finna ĉefurbo Helsinko (Helsingfors) la 14-a altiris milon da delegitoj, malgraŭ la necentreco de la loko. Grandioza, vere, estis en la Finna Nacia Teatro la malferma kunsido. Vere elektita estis la partoprenantaro: kvaliton akompanis spirita alteco. S-ro Loimaranta, Ministro pri Publika Instruado salutis la kongreson esperante, kaj deziris sukceson al ĝiaj laboroj. Ministerioj pri Publika Instruado el 9 landoj estis reprezentataj. Ankaŭ sendis delegitojn ĉiuj gravaj internaciaj organizoj: sciencaj, sociaj, komercaj, laboraj. — La grandaj internaciaj foiroj kreitaj dum la lastaj jaroj ne preterlasis ankaŭ la okazon por sin reprezentigi en tia medio, tiel diversa kaj pro tio interesa kia estas la Esperantistaro. Krom tio, delegitoj el 31 nacioj salutis je la nomo de siaj landoj. Estis legataj saluttelegramoj el ĉiuj mondpartoj: de Eminentaj Esperantistaj, kiel fama franca scienculo generalo Sebert, ano de la Franca Instituto (scienca akademio), unu el la plej ardaĵ pioniroj Esperantaj; de esperantaj organizoj el la tuta mondo, de malproksimega, ekstrema Sudo, kiel de ekstrema Oriento. Fama filologo, profesoro Setälä legis sciencon verkon filologian, entuziasmigan por la protagonistoj de Internacia, artefarita, helpa lingvo. Kiel distraĵoj de la kongreso, oni devas citi la naciajn kantojn, muzikilojn antikvajn, kaj ĥorojn. Tre interesa estis la ekakursoj tra la suda parto de la lando al Imatra akvorapidoj, kaj tra la Golfejo inter la insuloj rokaj. Sed pleje oni admiris la laboremon kaj vigecon de tiu popolo kiu, konstante preskaŭ baraktas kontraŭ la elementoj, kaj ofte domptas ilin kaj utiligas por sia prospero.

La ĉefa merito de tiu kongreso estas tamen la fina diskuto kaj akcepto de la organiza projekto kiu: naskiĝinte en Boulogne en 1905, dormis, veketiĝis, redormis por fine trudeme sin reprezenti, ekvivi. Ĝi montros al la dubantoj, ni esperas, la veran staton kaj forton de Esperanto en la mondo.

Adiaŭinte la belan ĉefurbon de la lando de millagoj, la golfojn kun siaj multenombraj rokaj, grizruĝaj insuloj, kaj ankaŭ la simpatiajn organizintoj, la Esperantistoj disigiĝis. Ĉiu kunportis en la koro la esperon revidi unu la alian post unu jaro en Nürnberg, kie oni akceptis prepari kaj jam preparas la 15-an kongreson.

Tie do en Aŭgusto de la nuna jaro kunvenos la formikaro por daŭrigi sian pacan agadon. Ni esperas kaj deziras, ke la politika situacio ne malhelpos ilin kaj ke tiu kongreso estos nova sukceso por nia movado.

*F. d'Ar Mor.*

## La „Federacio“ kaj la „Triumfonta“.

La „Esperanto Triumfonta“, kiu presigis „in extenso“ la strangan komunikon de la „Federacio de Esp. Soc. en Polujo“ kun iaj neklaraj kaj vualitaj kulpigoj kontraŭ nia eminenta pola samideano D-ro Emiljan Lotb, publikigis kelkajn semajnojn poste la respondon de la Doktoro, el kiu ĝi opinis konvena kelkajn frazojn forigi, kiel „necesajn“, kaj samtempe donis al polaj samideanoj utilan konsilon. Se la intenco konsili pruvas bonkorecon (iafoje ĝi pruvas ankaŭ troan fidon al propra saĝo) — la ĉirkaŭ tranĉado de la defendo kiam oni plenpresigis la ofendon ne saĝas al ni konforma al la moroj de konsciencia redaktado.

Pri la afero mem, kiu kaŭzis la ambaŭ publikigojn, ni kredas rajti deklari, ke D-ro Lotb ne insistis pri la invito de la Universala Kongreso en 1923 al Warszawa sekvinte unuaniman decidon de ĉiuj Poloj, partoprenintaj la Kongreson en Helsinko, kaj ankaŭ la opinionon de plej eminentaj eksterlandaj samideanoj. Ĉiu, kiu konas la rilatojn de pola esperantista vivo, scias, kian rolon ludis kaj ludas en ĝi la Attestimata Doktoro, kaj kiel neserioze prezentigas la kulpigoj de la estraro de apenaŭ naskiĝinta Federacio.

## KOMUNIKOJ.

— Funebro, kiu kovris tutan Pollandon post morto de Prezidanto de Pola Respubliko, refleksiĝis ankaŭ en la vivo de Pola Esperantista Societo. Estraro de P. E. S. kunigante kun doloro de tuta nacio decidis pro funebro interrompi kunvenojn kaj kluban vivon por tri semajnoj.

— La 6-an kaj 7-an de Januaro okazis III konferenco de la Pola Esperantista Societo reprezentata de 7 provincaj grupoj. Plej grava decido de tiu konferenco estis unuanime akceptita decido ekzigi el Federacio de Esp. Societoj en Polujo.



— Organizigis eldona societo bazita sur fonda kapitalo de 2000.000 pmk. dividita je 40 akcioj. Oni antaŭ sciligas nin ke tiuj akcioj estas jam disvenditaj kaj ke oni plialtigas la kapitalon per novaj dudek akcioj, kiuj estos nove emisitaj por samideanoj, kiuj deziros aliĝi al tiu eldona societo. Pri ĉiuj informoj oni turnu sin al Pola Esperantisto, Warszawa, Królewska 19.

— La 11-an de Januaro en loĝejo de P. E. S. (Królewska 19) okazis tevespero kiun bonvolis ĉeesti S-ro K. Zamenhof. D-ro S. Karlsbad faris malgrandan paroladon, varme aplaŭditan de ĉeestintoj.

— Jaŭde 25-a de Januaro okazis kutima dusemajna tevespero. S-ro St. Essigman parolis pri Historio de Pola Esp. Societo.

— Estraro de P. E. S. sciligas nin ke kunvenoj okazas ĉiu lunde kaj jaŭde je 8 h. vespere str. Królewska 19.

— En Jarosław vigle propagandas nian aferon S-ro L. Fischer, kiu gvidas nun kurson ĉe ŝtata gimnazio. La saman kurson gvidas ankau S-ro Dornfeld.

— En Wołkowysk gvidas kurson S-ro M. L. Kaplan.

— En loĝejo de P. E. S. Królewska 19, konstantan kurson gvidas P-ro M. Kaus. Personoj kiuj volas aliĝi bonvolu veni ĉiujarde je 8-a vespere.

— En Żółkiew senlace propagandas S-ano E. Hay, kiu skribas pri nia movado en Gazeta Lwowska.

— Gvidanto de P. E. S. Grupo Pabjanice S-ro Józef Konderak transloĝigis al Łuck kie li komencas propagandi. Ni esperas baldaŭ, dank' al senlaca laboro de S-o Konderak, malfermi filion de P. E. S. en Łuck.

— 27-an de Decembro okazis en Łódź edziĝo de nia eminenta kaj malnova Samideano S-ro Włodzimierz Pfeiffer kun samideanino Stanisława Lissner. Al juna paro redakcio de Pola Esperantisto sendas plej korajn gratulojn.

— Al redakcia komitato de Pola Esperantisto aliĝis nia malnova, eminenta samideano Bronisław Kuhl, el Kraków kies talentan plumon konas ĉiu esperantisto.

### Adresaro Katolika tutmonda.

IKEO. (Internacia Katolika Esperanto Oficejo), eldonos dum la jaro 1923 internacian adresaron de katolikaj Esperantistoj. Ĉiu katolika samideano povas publikigi sian adreson kun mallonga rimarko: P.M., L., P.K., ktp. Informojn donas IKEO Graz, Karmelitenplatz 5, Aŭstrio.

### 3-a Internacia Katolika Agada Kongreso.

La 3-a Internacia kongreso de lka okazos en Konstanz ĉe Bodensee la 29-an de Julio ĝis 2-a de Aŭgusto. Estas aranĝata speciala sekolo kie estos prilaktata la grava problemoj: *kiel sukcedi kaj praktike disvastigadi nian helplingvon en katolikaj rondoj*. Esperanto estos uzata dum la tuta kongreso, ĉefe kiel traduka lingvo, precipe por montri praktike ĝian grandan taŭgecon ĉe internaciaj kongresoj. Ĉiulandaj katolikaj samideanoj kore estas invitataj partopreni je nia kongreso, kiu ĝuste finĝas je malferma tago de la Nürnberga kongreso. Informojn donas „lka“, Graz Karmelltenplatz 5, Aŭstrio.

### Libroj kaj Gazetoj.

**Leo Turno.** Kompletny podręcznik języka międzynarodowego Esperanto. Kraków. Nakładem Towarzystwa „Esperanto“ 1922, 70 stron.

Podręcznik ten, pierwszy po wojnie w języku polskim, typem swym niewiele odbiega od wszystkich dotychczasowych, wyczerpanych już zupełnie, jak Rybczyńskiego, Łazicy lub Kuhla, od których wziął zwyczajność i podpatrzyć potrafił ich strony dodatnie, zręcznie omijając ich braki. Na metodzie nauczania znać pewien wpływ E. Privat'a, dzięki czemu ćwiczenia nie są tak banalne, jak w dziełkach dawniejszych.

Zarzucićby można autorowi kilka dowolności w interpretacji szczegółów, jak np. używanie dużego V przy zaimku osobistym i dzierżawczym liczby pojedynczej (VI, Vla), dla odróżnienia od liczby (vi, vla)—rzecz dotychczas nigdzie nie spotykana a najzupełniej zbyteczną (jak autor tę różnicę uwypatnił w ustnym użyciu?)—lub wprowadzenie sufiksu *io* na oznaczenie krajów bez żadnego objaśnienia, że sufiks ten znajduje się jeszcze w stadium próbnym, bez wielkich szans ogólnego przyjęcia; wszak nawet komitet językowy i akademii ostatnio go odrzuciły.

Szczegóły te, jako uboczne, nie zmniejszają jednak wartości podręcznika, który zadanie swe rozszerzeniu znajomości Esperanta godnie będzie mógł pełnić.

### Gazetof ricevitaj:

— Skandinava Esperantisto, La Marto, Export Esperantist, Belga Esperantisto, Vegetarano, Literatura Mondo.



# O d e z w a

## Zarządu Polskiego Towarzystwa Esperantystów.

### *Esperantysto!*

Rozwój ruchu esperanckiego w Polsce i na całej kuli ziemskiej stawia nas wobec konieczności jak największego zcentralizowania naszych wysiłków, aby móc skutecznie podjąć pracy w takim zakresie, jakiego domagają się dzisiejsze warunki.

Rozstrzeleniu i odosobnieniu poszczególnych jednostek i drobnych grup lokalnych przeciwstawić należy zwartą i sprężystą organizację, obejmującą kraj cały, zdolną do przezwyciężenia przeszkód materialnych i technicznych, stojących na drodze do naszego celu.

Polskie Towarzystwo Esperantystów, istniejące od roku 1906, skupiające zawsze najwybitniejsze siły esperanckie naszego kraju, posiadające już przed wojną liczne oddziały prowincjonalne na terenie b. Królestwa Kongresowego, a obecnie rozpościerające faktyczną swą działalność na wszystkie dzielnice Rzeczypospolitej—winno stać się ośrodkiem polskich sił esperanckich, zjednoczonych i zorganizowanych w myśl idei przewodnich Towarzystwa: „W Polsce dla Esperanta” i „Przez Esperanto dla Polski”.

Wzywamy więc wszystkich Polaków-Esperantystów do zapisywania się na członków Towarzystwa, wszystkie polskie grupy esperanckie do przystępowania doń jako Oddziały, wzywamy do tworzenia nowych Oddziałów w miejscowościach, gdzie w myśl Statutu Towarzystwa zbierze się 15 osób, pragnących Oddział ukonstytuować. Deklaracje z podpisami takowych kierować należy do Centrali Towarzystwa, Królewska 19, Warszawa.

Tylko zjednoczeni zdołamy odpowiedzieć godnie wielkiemu zadaniu jakie ciąży na nas, jako na ojczyźnie Esperanta, zdołamy w sposób właściwy reprezentować kraj nasz wobec wszechświatowego ruchu esperanckiego i informować o nim zagranicę.

Niech z Nowym rokiem zrozumieją to wszyscy, którym idea nasza jest drogą, niech staną do wspólnej z nami pracy dla dobra Ojczyzny i całej ludzkości!

*Zarząd*

*Polskiego Towarzystwa Esperantystów.*

Warszawa, dn. 1 Stycznia 1923 r.

---



---

## OD ADMINISTRACJI.

Wszystkich naszych prenumeratorów na obszarze Rzeczypospolitej prosimy o wpłacanie należności za pośrednictwem P. K. O. czeku № 3874, w wypadkach nadsyłania przekazem pocztowym prosimy adresować imiennie: St. Karolczyk (Pola Esperantisto) Warszawa, Królewska 19.

---



---

## SCIIGO DE LA REDAKCIO.

Dank' al kora akcepto, kiun ni ricevas el ĉiuj flankoj kaj dank' al oferemo de multaj samideanoj, kiuj tiel multnombre aliĝas al antaŭ nelonge fondita eldona societo kies unua paso estis respero de „Pola Esperantisto“ ni povas jam de komenco de jaro fari nian organon pli ampleksan kaj kun pli bela eketero. Por estonto ni ankaŭ promesas laŭ niaj ebloj kontentigi niajn legantojn.

### LA REDAKCIO.

---



---

ENHAVO: *Jan Kostecki*: Novjaraj konsideroj. — *Eska*: El la ciklo: La pola vilaĝo. Rikolto. La kverko maljuna. *Br. Kuhl*: Raporto de D-ro Čang-Fu-Li. — *Dr. Antoni Czubryński*: Mankoj en nia propagando. — *Baroko*: Solvo nenion solvanta. — *F.-d'Ar Mor*: Historia resumo de niaj kongresoj. — La „Federacio“ kaj la „Triumfonta“. — Komunikoj. — Libroj kaj Gazetoj. — Gazetoj ricevitaj. — Odezo de Zarządu Polskiego Towarzystwa Esperantystów. — Od Administracji. — Sciigo de la redakcio.

---



---

Redaktoro kaj eldonanto: STANISŁAW KAROLCZYK

---



---

Redakcio kaj administracio: Warszawa, str. Królewska 19.  
Funkcias nur lunde kaj ĵaŭde de 8–10 h. vespere.

Presejo: Wacław Maślankiewicz. Warszawa, Nowogrodzka 17.



# PRZEGLĄD ŚWIATOWY

(La Monda Revuo)

de 1923 jaro aperas semajne.

Redakcio kaj administracio Warszawa,  
Sienna 23.

Oni korespondas esperante.

# WOLNA MYŚL, WOLNE ŻARTY

(LIBERA PENSO, LIBERAJ ĤERCOJ)

plejdisvastigita humora revuo en Polujo

Redakcio kaj Administracio, Łódź,  
Andrzejka 17.

# SINJORO TADEO.

de ADAM MICKIEWICZ

DEVAS TROVIĜI EN ĈIU ESPERANTA BIBLIOTEKO.

LA PLEJ GRAVA VERKO ĜIS NUN  
APERINTA EN MAJSTRA TRADUKO  
DE ANTONI GRABOWSKI ESTOS  
BALDAŭ ELĈERPITA. RAPIDU MENDI ĜIN.

MENDEBLA ĈE: Oficejo „Promień” — Warszawa,  
Widok 19.

Prezo en Polujo 1 egz. Mkp. 5.000.

Eksterlande 6 fr. 10.000 Mkp. aŭ egalvaloran  
sumon en nacia mono.

---

Redaktoro kaj eldonanto: STANISŁAW KAROLCZYK.

---

Presejo: Wacław Maślankiewicz, Warszawa, Nowogrodzka 17.